# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ huhtikuu ◆ aprilo ◆ 2/2007



*Talvikki Saarenkari, Markku Sarastamo, Kati Lindell kaj Marjatta Niemi en la Vintraj Tagoj reprezentis la ĵus fonditan asocion Verda Kastelo R.Y. – Esperanto-Societo en Hämeenlinna. La surmuraj bildoj ilustris la prezenton pri Japanio.*

## Aranĝoj de la Jubilea jaro, p. 3-7

Teuvo Alavillamo aganto de la jaro, p. 16 ◆ Vintraj Tagoj, p. 9

30-jara FEJO, p. 22 ◆ Vilho Setälä la plej grava, p. 26

# ESPERANTOLEHTI

**Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet** ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 eaflehti@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*
Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 💻 mmakita@utu.fi
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 💻 ilkka.santtila@welho.com
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 18 e/vuosi/år/jaro;
Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 💻 eaf@esperanto.fi
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*
Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 🖷 (02) 423 246 💻 eafprezidanto@esperanto.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:** tuomo.grundstrom
*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 💻 @lailanet.fi
*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 💻 esperarto@phnet.fi
*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 💻 taneli@poczta.onet.pl
*Jukka Laaksonen*, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 💻 jvaleto@kolumbus.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Mira Anonen*, Karstulantie 8 E 70, 00550 Helsinki. ☎ 040 759 2184 💻 mira.anonen@helsinki.fi
*Olli Pajula*, Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. ☎ 050 571 9224 💻 olli.pajula@baanamail.fi
*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ 040 592 1756 💻 timo.pirinen@gmail.com

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet**: http://www.esperanto.fi



# Aldona fortostreĉo kondukas al ekstra jubilea numero

En iuj momentoj mi kiel asocia prezidanto sentas dubojn. Mi havas fortan konvinkon pri la valoro de la lingvo kaj la organizita laboro por Esperanto, sed mi dubas pri mia rolo en la plenumo de ambiciaj planoj. Nekomforte longas mia listo de farendaĵoj kun aldona memadmono. Speciale embarasa estis la malfruiĝo de la unua numero de la jaro. La iamaj revoj pri la jam frujanuare laŭminute planita festa tago frakasiĝis. Nu, kredeble neniu reale tiom perfektemis, sed ja troviĝis ambicioj pri frua gazeto.

Ne malofte mi sentis dubon pri la planoj naskitaj antaŭlonge por la estonta "tutjara, tutlanda, ĉiuinspira" festo. Koŝmare ĉio iĝas nur tutjara, tutlanda ĉiustreĉa elreviĝo. Nu, skribante tion mi jam ridetas. Absurde! Jam senteblas sukcesoj. La gratulaj kontribuoj pli kaj pli pezigis la jubilean skatolon. Mi vidis etajn noticoj el pluraj lokaj gazetoj. Mi vidis tiom da interesitaj vizaĝoj en Vintraj Tagoj. Ekspozicioj stariĝis kaj pliaj estas planitaj. En Hämeenlinna fondiĝis nova asocio kaj la asocio en Lahti ankoraŭ agas.

En 2002 kiam mi prezidantiĝis mia ĉefa ambicio estis atingi ke agadi por EAF estu pli facila, ke la aktivuloj povu kunsidi por antaŭenigi la asocion sen grandaj zorgoj pri vojaĝokostoj, de tempo al tempo sen propraj elspezoj ĝui efikan pensinterŝanĝon ĉe bona manĝo. EAF havigu pli da enspezoj, mi deklaris. Nun, kvin jarojn poste, konstateblas, ke la evoluo iras en la deziratan direkton – sed malrapide. La edukministerio ĉiujare pagas 1 000 eŭrojn por subteni nian gazeton kaj Fondumo Esperanto taksis la evoluigajn planojn de EAF subteninda per pluraj miloj. Svenska kulturfonden subtenas la historian laboron kaj nian temon "Pluraj lingvoj praktike". La celo ricevi subvenciojn de la Finna kulturfondaĵo ankoraŭ ne realiĝis, sed lastfoje ĝi ricevis grandan kvanton da – laŭ nia takso – tute seriozaj Esperantoligaj petoj kaj mi ne dubas ke la esperantistoj kapablos tiajn insiste produkti. La gutoj ĉiujare frapos la graniton de la Finna kulturfondaĵo. "Eĉ gutoj malgrandaj ..." Jen trankviliga penso.

Ho, mi jam optimismas! Tia estas la vivo de prezidanto, plena de bonfido kaj kontento inter momentoj da mizero. Nu, konfesindas ke ankaŭ tiu ĉi kolumno verkiĝas je nekonvena horo iom post la prirevita finpretiga dato, sed fiere mi anoncu ke la nuna numero iras al la presejo jam en marto, malpli ol tri semajnojn post la apero de la antaŭa. Estas kaŭzo de ĝojo ke ne mankas temoj kaj tekstoj por plenigi gazeton. Jam pretas por sekva numero enkonduko en la mondon de Universala Kongreso kaj artikolo pri Lernu.net. La fortoj investitaj en la jubilea jaro motivigas apartan jubilean numeron kun granda emfazo al materialo interesa al ekstera publiko. Anoncvarbado jam portis rezultojn.

*Anna Ritamäki*

**Esperanto-Asocio de Finnlando 1907-2007**
*Alta Protektanto de la jubilea jaro:* **Tarja Halonen**, Prezidento de la Respubliko

# Jubilea tago 28.4.2007 en Helsinko

**Ĉu troveblos la kvizo?**
Se vi alvenos matene, kiel trovi la kvizopunktojn? Verŝajne pertrajnaj vojaĝintoj komencos per trovo de helpanto en la fervoja stacidomo kaj perbusaj en la vojaĝcentro, sed aliaj komencoebloj estas ekz. la Esperantooficejo, kie nestos aktivulo de la UK 1995 kaj la Nobelara domo, kie troveblos la LKK-prezidanto de 1922. La kvizo videbligas Esperanton en la urbo je 9-12 h.

**Ĉu lerni pri la nobelaro?**
Ulla Salonen, ĉiĉerono, konatiĝis kun nova prezentota kampo, la historio de la Nobelara domo kaj nature ankaŭ de la Finnlanda nobelaro kaj iliaj blazonoj pendantaj sur la muroj de la ĉefa salono. Eklernu kiel distingi la blazonan ŝildon disde la eksteraj ornamaĵoj kaj konkludi la rangon laŭ kvanto de helmoj! Vi pli ĝuos la murojn dum la ĉefa festo se vi partoprenos la senpagan Esperantlingvan prezenton. Starto je la 10a kaj la 11a h (ĝustatempa alveno necesa).

**Ĉu manĝi kun jubilea rabato?**
Fazer Amica donas al la festantoj de la jubileo de 28.4.07 20-procentan rabaton en siaj du restoracioj en la 6:a etaĝo de la grandmagazeno Stockmann. Tie eblas ripozi la piedojn post la antaŭtagmeza kvizpromeno kaj kolekti la fortojn por la jubilea festo.

**Ĉu kunpreni kunulon?**
La jubilea festo je 14.00-17.00 en la Nobelara domo (Ritarikatu – Riddaregatan 1) estas Esperantlingva kun informetoj finne kaj svede. Ni prizorgos skribajn tradukojn de paroladoj kaj flustran interpretadon al kelkaj invititaj eminentuloj. Se vi konas personojn, kiujn vi ŝatus inviti kaj gvidi tra la programo tio estas bonvena. La programon gvidas Harri Laine. Doktoro Renato Corsetti, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, festparolos. Inter la artistoj troviĝas vira koruso kun anoj de Steleto, ĝis nun pli konata inter blinduloj ol inter esperantistoj, kaj la eminenta kantelisto Timo Väänänen.

**Ĉu daŭrigi per bankedo?**
Vi jam scias ke estos ofertata bona manĝo kaj kompanio, sed ni malkaŝu ankaŭ ion pri la kultura akompano en la restoracio Pörssitalo. Por ni ludos la kvarteto Virta, kiun konsistigas junaj profesiaj muzikistoj aktivaj en i.a. Ylioppilaskunnan Soittajat kaj Aholansaari Sinfonietta, du violonoj, aldo kaj violonĉelo.

**Ĉu aŭ ne tranokti?**
La programo de la jubilea tago estas planita tiel ke al multaj lokoj en Finnlando eblas alveni kaj foriri samtage – tamen por partopreni la tuttagan programon tranoktado povas esti konsilinda. Se vi devas elekti nepre donu antaŭrangon al la ĉefa festo, sed kompreneble ni rekomendas ankaŭ la antaŭtagmezan programon, kiu videbligos la jubileon en la centro de la urbo je 9-12 h kaj la bankedon je 18.30-22 h. Ekzemple mi kaj mia patrino jam mendis la antaŭan kaj postan nokton en la Sokos-hotelo Helsinki, Kluuvikatu 8. Ni rajtas oferti la ĉambron ankaŭ por vizitantoj, kiuj volas ripozi aŭ ŝanĝi vestaĵojn ekz. inter la festo en la Nobelara domo kaj la bankedo.

*Anna Ritamäki*

## Bonvolu anonci vian partoprenon!

Antaŭanonco por la posttagmeza kaj vespera programo, la ĉefa festo kaj la solena bankedo, estas grava por la sukcesigo de la aranĝoj. Bedaŭrinde en la numero 1/2007 mankis supersignoj kaj iuj informoj en la invito. Iuj de vi vidis ankaŭ korektan gazeton ĉar la presejo poste presis por ni 200 pliajn.

Anoncu vian partoprenon, **prefere ĝis la 16a de aprilo.**

**pagante** al EAF ĉe **Sampo 800017-230825** kun referencnumero **80499** (samtempa pago de membrokotizoj, donacoj k.s. ebla, sed pro la referencokampa numero, kiu malaltigas la bankajn kostojn, la mesaĝa kampo ne transdoniĝas; pago sen referenco ankaŭ funkcias)

**informante** pri la celo de la pago (taga festo 15 e, bankedo 70 e) al **Esperanto-Asocio de Finnlando**, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, **eafoficejo@esperanto.fi** (traktas Päivi Saarinen), telefonaj anoncoj ankaŭ eblaj

- por ĉiu partoprenanto persona kaj familia nomoj
- plena poŝta adreso kaj, se adekvate, telefono kaj retpoŝto
- eventualaj apartaj konsideroj (dieto, rulseĝa moviĝo k.s.)

## Jubilea bankedo en restoracio Pörssitalo

La jubilea bankedo okazos en restoracio Pörssitalo, adreso: Fabianinkatu 14. La estraro decidis ŝanĝi la lokon pro diversaj kialoj al ejo, kiu estas pli samaĝa kun la jubilea asocio. La impona granita konstruaĵo de jugend-stilo estis konstruita 1910, la arkitekto estis Lars Sonck. Aliaj aranĝoj por la bankedo restos samaj.



## Jubilea poŝtmarko komunikas

Esperanto-Asocio de Finnlando aperigos okaze de sia 100-jariĝo la 28an de aprilo 2007 poŝtmarkon menditan de la Finnlanda Poŝto laŭ la proprabilda sistemo *Omakuva*. La valoro estas laŭ klaso 1 por ĝis 20-grama sendaĵo al ĉiuj landoj, por ĝis 50-grama enlande. Klaso 1 egalas laŭ la nuna poŝta tarifo al 70 cendoj. Por pagi la kostojn de la Omakuva-servo kaj ricevi etan makleraĵon EAF vendas la markon por 1,50 eŭroj, kajereton kun 8 markoj por 12 eŭroj.

En la poŝtmarko aperas la tekstoj *Komunikado* kaj *Esperanto-Asocio de Finnlando 1907-2007* kaj sesparta serio de komunikantaj pupoj kreitaj de Francisco Veuthey. La desegnisto iĝis konata kiel redaktoro de Kontakto kaj Jarlibro de UEA. Li ilustris kaj grafike preparis plurajn eldonaĵojn. La komunikulojn li konceptis por EAF kadre de la projekto *Al kvalita komunikado*. La ĉefa koloro estas verda. La verdaj pupoj aperas sur diverskoloraj fonoj.





***Tiel ĉi proksimume aspektos la jubilea poŝtmarko en kadro provizita de la Finnlanda Poŝto.***

EAF mendis komence nur 24 kajerojn kun po 8 markoj, sed povas mendi pliajn se la intereso estas granda. Por certigi sufiĉan kvanton direktu al la prezidanto de EAF antaŭmendojn ĝis la 16a de aprilo.

# Historia kvizpromeno
# Esperantovisailu – Esperantotips serĉas sian formon

Dum VT en Kotka la laborgrupo pri la historia kvizpromeno faris etan provon, kiu donis utilajn spertojn. Apud la akceptejo de la hotelo estis klarigoj pri Tyyne Leivo-Larsson kun rolonta Kristiina Hautamäki, kiu en aprilo helpe de Aila Havia havos pli da simileco al Tyyne. En T-ĉemizo kun teksto ESPERANTO Carola Antskog kiel helpanto instigis homojn partopreni la konkurson. Estis nun nur du demandoj, la alia demando estis pri Nino Runeberg, kies rolonto Taneli Huuskonen akceptis la respondokuponojn.

Pieni kokeilu Kotkassa antoi tärkeitä kokemuksia “Esperantovisailu kaupungilla”-työryhmälle (Carola Antskog, Aila Havia ja Taneli Huuskonen). Huomattiin mm. apulaisten tärkeys. Tarvitaan apulaisia kertomaan ohikulkijoille mistä on kysymys ja innostamaan heitä osallistumaan visailuun. Tähän tehtävään sopii myös aloittelija. Innosta siis kiinnostuneita nuoria tulemaan Helsinkiin 28.4, ensin apulaisina ja sitten pääjuhlaan. Ilmoita jollekin työryhmän jäsenelle ketkä tulevat. Nuoret saavat olla yhdessä niin ettei kenenkään tarvitse mennä ihan yksin tuntemattoman ihmisen apulaiseksi. Tietysti vanhempiakin avustajia tarvitaan.



***Tuomo Grundström samtalar med Kristiina Hautamäki som rollfiguren Tyyne Leivo-Larsson, medan Carola Antskog försöker övertyga flera personer att delta i “Esperantotips på stan”.***



## Prelega turneo de UEA-prezidanto Renato Corsetti

La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Renato Corsetti venos de Italujo al nia jubilea festo. La semajnon antaŭe li prelegos lige en nia tema programo “Pluraj lingvoj praktike”, kiu kulminos per simpozio en oktobro. La horaro de la prelega turneo estas jena:

- Merkrede 25.4. je 16.00 en Universitato de Helsinki, ĉefa konstruaĵo, aŭditorio XIII (eniro de Unioninkatu) kunlabore kun la fako pri ĝenerala lingvistiko
- Ĵaŭde 26.4. posttagmeze en Tampere, prelego kaj vizito al la Esperanto-ekspozicio de la ĉefbiblioteko Metso.
- Vendredre 27.4. posttagmeze en ĉefbiblioteko de Turku, temo pri italoj

Ĉiuj prelegoj estos publikaj kaj indas rekomendi ilin al viaj konatuloj kaj amikoj. Kontaktulo pri la turneo estas EAF-sekretario Tiina Oittinen. La ekzaktaj informoj aperos ĉe *www.esperanto .fi* (▷ Juhlavuoden ohjelma) kaj en la retlisto EAF-agadas.

## Esperanton maailmanliiton puheenjohtajan Renato Corsettin luentokiertue

Esperanton maailmanliiton puheenjohtaja, italialainen Renato Corsetti tulee Suomeen muutamaa päivää ennen Suomen Esperantoliiton satavuotisjuhlaa ja tekee seuraavan luentokiertueen. Hänen vierailunsa liittyy juhlavuoden teemaan “Käytännön monikielisyys”.

- Ke 25.4. klo 16.00 Helsingin yliopistolla, päärakennus, auditorio XIII (käynti Unioninkadulta), yhteistyössä yleisen kielitieteen laitoksen kanssa
- To 26.4. iltapv: Tampereella, luento ja vierailu pääkirjaston esperantonäyttelyssä
- Pe 27.4. iltapv: Turun pääkirjasto, luennon aihe italialaisista ja heidän tavoistaan

Kaikki luennot ovat julkisia yleisöluentoja, joita voitte hyvin suositella ystäville ja tuttaville. Luentojärjestelyjen yhteyshenkilö on liiton sihteeri Tiina Oittinen. Seuraa myös ilmoituksia nettisivuillamme *www.esperanto.fi*/juhlavuoden ohjelma ja EAF-agadas -sähköpostilistalla.


## Festivalo Arta Lumo – favore en aprilo

La aliĝkotizo por la festivalo Arta Lumo, kiu flamigos Esperantokulturon en Kuopio 27.7-1.8.2007 estas por A-landanoj 110 eŭroj (sub 26-jaraj 100 e, sub 13-jaraj 55 e) ĝis la fino de aprilo, kiam ĝi altiĝas al 135 eŭroj. La unua aliĝperiodo estas plilongigita per unu monato. Festivalo Arta Lumo havas apartan konton Sampo 800010-71256003, referencnumero uzebla se vi pagas de enlanda konto: 80499.

Opero, danco, teatro, literaturo, ĵonglado, kinejo, komuna kreado, ĉebivaka kantado kaj abunda alia programo. Ni havas indikojn laŭ kiuj ni povos malkaŝi al vi kiel sonas eta instrumento nature kreskanta, kiun nur tre malmultaj kapablas bele sonigi. Esperantokursoj ankaŭ por komencantoj.

Malfacilas trovi liberajn tranoktlokojn en la regiono dum la festivala periodo, sed ne zorgu! EAF havas grandan rezervon por la festivalanoj, ankaŭ tre favoran komunan loĝadon en lernejaj ĉambroj por diversaj bezonoj (nokta trankvilo aŭ viglo).

La aliĝilo aperis en EF 1/2007. Ĝi ankaŭ aperas rete ĉe *www.esperanto.fi*. Informilo distribuiĝas interalie kun La Ondo de Esperanto. La retadreso: *ArtaLumo@esperanto.fi* atingas la organizantojn (prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario de EAF).



# Ni estas en la reto

Estas diversaj opinioj pri kiom indas uzi naciajn lingvojn en Esperanto-gazetoj. En nia lasta numero Pentti Makkonen esperis pli da finnlingvan informon, sed iuj pensas, ke nacilingvaj artikoloj estas tute senutilaj.

Certe ni volus oferti ĉiam ion legeblan al finnoj, kiuj ankoraŭ ne parolas Esperanton, sed ricevas la gazeton ie por foliumi. Sed ni havas ankaŭ kelkajn dekojn da eksterlandaj abonantoj, por kiuj estus nur ĝene, se ni havus gazeton plena de finnlingvaj artikoloj. Meti la samajn artikolojn kaj en la finna kaj en Esperanto estus iom stulta solvo, ĉar plejparto el niaj legantoj tamen scipovas kaj la finnan kaj Esperanton. Limigon difinas ankaŭ mono, ĉar kvar pliaj paĝoj da gazeto kostas por EAF kelkajn dekojn da eŭroj en presejo kaj poŝto.

Ekde lastjara decembra numero Esperanta Finnlando ekzistas ankaŭ en interreta formo, kvankam tio estas maljam nun publike anoncata: oni trovas ĉiam la plej freŝan retan version en adreso *http://www.esperanto.fi/esperantolehti*. En la reta versio estas nur parto el la artikoloj de la papera gazeto, sed la novaĵoj estas tie plejparte kaj en la finna kaj en Esperanto.

Oni povas demandi, ĉu ne indus meti ĉiujn artikolojn en la reton kaj eĉ konsideri rezignon pri la papera gazeto. La reta versio ne kaŭzus preskostojn kaj spaco por artikoloj ne estas tiel limigita kiel surpapere – oni povus eĉ fari ĉiujn artikolojn dulingve aŭ plurlingve sen zorgo pri kreskantaj kostoj.

Tio tamen estus tro hasta konkludo. Unue, jam nura tradukado de ĉiuj artikoloj estus pena laboro, kaj grandparte vana, se niaj legantoj tamen komprenas kaj la finnan kaj Esperanton. Due, ĝisdatigado de tre vasta reta paĝaro estas granda tasko, kaj aliflanke ankaŭ leganto de TTT-paĝoj en interreto povas iĝi perdita en la amason da informoj en diversaj paĝoj. Uzebleco de TTT-paĝoj tamen estas en multaj aspektoj malpli bona ol de papera gazeto: oni ne povas porti TTT-paĝojn en sako aŭ poŝo, oni foliumas TTT-paĝojn malpli rapide ol paĝojn de gazeto, oni ne povas krajone substreki la plej gravan informeron de TTT-paĝo, kaj nur malmultaj homoj legas TTT-paĝojn en komforta pozicio en brakseĝo. Fotoj ankaŭ aspektas pli belaj en bonkvalita presaĵo ol sur komputila ekrano – ofte eĉ se la presaĵo estas nigrablanka.

Verŝajne la plej grava avantaĝo de papera gazeto en informado de asocio estas, ke TTT-paĝaron oni ne povas disdoni al interesuloj ĉe budo en foiro aŭ iu simila evento. Maksimume oni povus disdoni adreson de la TTT-paĝaro kaj esperi, ke la homoj iam memoros viziti ĝin. Grava trajto de la gazeto ankaŭ estas, ke ĝi konserviĝos en arkiva bretaro, kie venontaj generacioj povos vidi, kio okazis.

Do, nia reta gazeto celas plenumi nur ian informan bezonon, sed ne anstataŭos la paperan gazeton en imagebla estonteco, kvankam Duplustro en lasta numero jam aludis ion tian.

*Mikko Mäkitalo*

# Vintraj Tagoj komencis Jubilean jaron

Kotka – ”Aglo” – estas la nomo de la grava kaj grandeta havenurbo en sudorienta Finnlando gastiginta niajn ĉijarajn Vintrajn Tagojn la 10-an kaj 11-an de marto. Loke aktivas Synnöve Mynttinen, kiun ni dankas pro la invito. Ejojn por la kunvenoj ofertis hotelo Seurahuone – ”Ĉambro de agrabla kompanio”. Nia kompanio estis agrabla sesdeko da gesamideanoj vaste el la lando, de Kotka ĝis Kittilä.

En la malfermo bonvenigajn vortojn kaj al la gastoj kaj laŭdajn vortojn pri la gastiganta urbo regalis la prezidanto de la urbestra komitato, eksparlamentanino Anna-Liisa Kasurinen. La centro de la 50-mila urbo estas negranda insulo, vizitojn al la ortodoksa preĝejo kaj al Maretarium, fiŝozoologia ĝardeno, ni agrable faris piede, kiel ankaŭ vespere promenadon al akva parko. Ĉiu havas siajn favoratojn inter la vidindaĵoj, certe por multaj tio estis la preĝejo. La ortodoksa paroĥo en Kotka nombras milon da eklezianoj, kaj kreskas, dank'al novaj Kotka-anoj el Ruslando.

Jam antaŭ la malfermo komenciĝis kelkhora enkonduka esp.-kurso, kiun partoprenis duondekduo da lernemuloj. Vespere, post gravaj kunvenoj sekvis la plej atendita kaj amuzanta kun- ▷



***Gajaj partoprenantoj de Vintraj Tagoj, unua linio de dekstre Maisa Djakonowsky, Kotka kun Antaŭen-anoj Anja Karkiainen, Terhi kaj Jukka Laaksonen, kiu reeniris la estraron post kelkjara paŭzo.*** *(Fotoj: Teuvo Alavillamo)*

veno: Aŭkcio de esperantaĵoj kaj aliaj objektoj donacitaj de anoj por esti vendataj profite al EAF. Sed ni havis nur unu horon! La lerta aŭkcisto Harri Laine vendis por 410 eŭroj, sed restis multe por sekva fojo. Atentu vian ŝancon.

La jarkunvena tago estas dimanĉo, kiu komenciĝis kiel decas per matenpreĝo okazigita de KELF, gvidita de Olavi Kantele. Pri la jarkunveno, prezidita de Jukka Pietiläinen, ĝiaj elektoj kaj decidoj legu aliloke en ĉi tiu gazeto, sed ni menciu la distingon: La Aganto de la Jaro estis nomita Teuvo Alavillamo el Siikainen (norda Satakunta) pro lia granda merito krei finnlingvan version de la reta kurso "lernu!" – studrondo tutmonda ofertanta anecon de esperanta lernokomunumo jam en 24 lingvoj. Estas vera kulturfaro. La modesta meritulo mallonge prezentis la kurson, kaj ni ĝin rekomendas: Ĉiam notu al interesito pri esperanto la adreson *www.lernu .net* kaj ĉe rerenkontiĝo, pridemandu kion li opinias.

La tagojn finis prezentado de la centjaraj jubileaj aranĝoj kaj la jubilea skatolo jam longe ĉirkaŭvaginta la landon, sed la Universala Kongreso transflanke de la terglobo ne estis forgesita: Saliko kun Seija kaj Kari Kettunen donis interesan prezenton pri la kongreslando Japanio kun diapozitivoj. Iuj bonŝanculoj el la sesdeko en Vintraj Tagoj ĝuos ankaŭ tiun someran eventon



***Harri Laine vigle gvidis la aŭkcion, kiu vendis malavare donacitajn varojn. Plej valora estis kolekto de esperantoglumarkoj.***

en la ekzotika oriento, sed la semajnon antaŭ tio – ĉiuj venu al Festivalo Arta Lumo al Kuopio en la ekzotika Savonio, por plufesti nian Jubilean Jaron.

*Tuomo Grundström*

## EAF havis 365 membrojn en 2006

Esperanto-Asocio de Finnlando jarkunvenis dimanĉon la 11-an de marto 2007 en Kotka kun kiel kunsida prezidanto Jukka Pietiläinen kaj kiel protokolanto Synnöve Mynttinen, la loka invitanto al kiu ni ŝuldas la realiĝon de plenprogramaj Vintraj Tagoj en 2007. (La estraro antaŭe serioze konsideris okazigi nur jarkunvenon en la jubilea jaro pro la laborŝarĝo de la aliaj eventoj.)

Anna Ritamäki estis reelektita prezidanto. Kiel estraranoj por 2007-2008 elektiĝis Jukka Laaksonen, Tiina Oittinen kaj Päivi Saarinen kaj kiel vicestraranoj por unu jaro Mira Anonen, Olli Pajunen kaj Timo Pirinen. Sen reelekto restas por plia jaro Börje Eriksson,Tuomo Grundström kaj Taneli Huuskonen. La prezidanto dankis al Markku Saastamoinen, Marijaliisa Parpala kaj Raita Pyhälä pri la farita laboro en la estraro.

Synnöve Mynttinen kaj Raimo Tuisku estis elektitaj revizoroj, vice Seija Kettunen kaj Sirkka Mattlin.

La kunveno traktis la agadraporton. Pri la membronombro eblas konstati ke post kresko en 2005 ĝi denove falis, per 14 membroj al 365, kio tamen superas la nombron de 2004 per 3. La ĉefa klarigo estas la falo en la FEJO-membraro al 12 membroj de la rekorda 30 pro kresko de EsperHe. Eta falo okazis ankaŭ en la kvanto de individuaj membroj, sed la ĝenerala tendenco estis stabila aŭ pozitiva. La kluboj de Helsinki, Iisalmi kaj Turku sukcesis altigi sian membronombron.

La okazigo de kursoj estis stabila kaj plurloke la lokaj esperantistoj kolektis la fortojn por realigi kursojn kaj ekspoziciojn dum 2007. ELFI startis novan servon, la retan liston E-ku, kiu informas pri Esperantokursoj al interesiĝantoj.

Helpe de la Al kvalita komunikado-projekta subvencio de FES sukcesis EAF sen escepta ŝarĝo al siaj financoj aktive kunsidi, kio estis nepre necesa prepare al la jubileaj eventoj. La negativa rezulto je preskaŭ 1 290 e klariĝas ĉefe per granda unufoja pago al la domkompanio de la oficejo. Inkluzive de preskaŭ 500-eŭra luo por la stokejo (sed sen telefonaj k.s. kostoj) la oficejaj kostoj sumiĝis al pli ol 3 200 eŭroj (en 2005 al prekskaŭ 1 900 eŭroj). La oficejo, kiun EAF kaj la loka klubo posedas kaj financas, provizas gravan stabiligan servon al la agado. La membrokotizoj donis en 2006 de individuaj membroj 792 e, de societaj membroj 904,50 e kaj de Societo Nino Runeberg 216 e, sume iom pli ol 1900 e.

La agadplano por la jaro 2007 menciis krom la jubileajn, informajn kaj instruajn prioritatojn ankaŭ la neceson revigligi la laboron pri vortaro finna-Esperanto. Teuvo Alavillamo, la Aganto de la jaro, menciis ĉi-lige la Lernu-vortaron, al kiu ĉiu ajn povas aldoni finnlingvajn vortojn. Temas pri facile konsultebla interreta vortaro. Speciale menciiĝis la bezono atenti al la financaj defioj.

La deziro estas fortigi la asocion sojle de la dua jarcento, sed necesas konscii ke vigla, videbla kaj altkvalita agado kunportas financajn riskojn. EAF streĉiĝas siajn fortojn por ricevi eksterajn subvenciojn kaj aliajn enspezojn, interalie donacojn. EAF povas ankaŭ provizi helpon pri formulado de testamentoj.

La membrokotizoj restas senŝanĝaj: 18 eŭrojn individua membro, 3 eŭrojn societa membro (1,50 eŭrojn societa membro ELFI, FEJO, Steleto) kaj 36 eŭroj por Societo Nino Runeberg.

*Anna Ritamäki*

## Gratulon al Mirja!

Mirja Vehkaperä, kiu en rolo de vicprezidanto en la komunuma deputitaro salutis la Aŭtunajn Tagojn en Haukipudas. Nun ŝi estas elektita parlamentano de la centra partio Keskusta kun 6963 voĉoj.

Aini Vääräniemi en Taivalkoski rakontas: ”Mia naskiĝdomo, Domo Halkola en Metsäkylä en Taivalkoski estas loko por diversaj eventoj. Antaŭ la elektoj Mirja Vehkaperä venis ĉi tien kun du aliaj kandidatoj por renkontiĝi kun vilaĝanoj. Aira Tauriainen kaj mi konsilis ŝin pri tio ke ŝi laborus por Esperanto tiel ke oni povus aranĝi elementan kurson de Esperanto en ĉiu liceo en Finnlando.”



# Kiel Finnlando nomiĝu en Esperanto?

Finnlando ne apartenas al ĉefaj punktoj de tiel nomata landnoma diskuto en Esperanto. Jam longe estis akceptita la formo Finnlando, kvankam foje oni vidas ankaŭ formojn kiel Suomio kaj eĉ Finlando. Tamen la afero ne estis tiel simpla.

Por plejparto de finnoj la afero estis ĉiam klara: ”Finnlando” estis la plej uzata formo. Jam en la unuaj numeroj de Finna Esperantisto en 1907 aperis artikolo pri la temo kaj la konkludo estis klara: finno kaj Finnlando estas la rekomendindaj esperantaj formoj. La uzo de Finlando postulus, ke landano devus esti ”finlandano”, kiu ne estas praktika.

Tamen Finnlando ne fariĝis ĝenerale uzata formo inter la eksterlandaj esperantistoj. La formo kun unu -n- (Finlando) estis ofta en internaciaj esperantaj revuoj. Revuo Esperanto de UEA uzis eĉ la formon Finnolando en la 1950-aj jaroj, evidente pro tio ke prononci -nnl- povus esti malfacila por iuj.

## “Suomio” ekaperis

Alternativa formo ”Suomio” aperis en internacia esperanta gazetaro la unuan fojon en la 1950-aj jaroj. En Finnlando ĝiaj plej fervoraj subtenantoj estis ĉefdelegito Joel Vilkki kaj Hemmo Tietti, ambaŭ el Somero, kaj aktivulo de laborista esperanto-asocio V. J. Kostiainen.

En Heroldo de Esperanto 1/1962 Hemmo Tietti, germano alveninta al Finnlando dum la milito kaj restinta en Finnlando, eĉ ŝanĝinta sian nomon el Helmut Dibelius al pli finneca formo, proponis ke Finnlando devus esti anstataŭigita per Suomio. Suomio estas formita laŭ la finnlingva formo de la lando (Suomi), sed internacie ĝi estas uzata nur en proksimaj parencaj lingvoj, estona (Soome), samea (Suopma), kaj en baltaj lingvoj, latva (Somija) kaj litova (Suomija).

Esperanta Finnlando aranĝis enketon pri la afero tiel, ke tiuj, kiuj abonis la gazeton por la jaro 1960 povis indiki sur la abonilo, se ili volas ke la nomo estu ŝanĝita al ”Esperanta Suomio” aŭ ke aperu ambaŭ nomoj. Tamen, kiel raportis numero 2/1960 nur tri personoj deziris ŝanĝon aŭ aldonon de Esperanta Suomio, dum pli ol 200 estis kontraŭ tio.

Tamen la diskuto ne malaperis. En 1964 kiam okazis la kunveno de esperantistoj, en la kunveno estis distribuita cirkulero ”Pri la nomo...” en kiu V.J. Kostiainen defendis la uzon de Suomio. Lia teksto aperis ankaŭ en Esperanta Finnlando 8/1964. Kostiainen subtenis la ŝanĝon, ĉar en la finna la vorto finno aludas al akno (finni, märkänäppylä). En Esperanta Finnlando 9/1964 aperis letero de Joel Vilkki por Suomio kaj leteroj de L. I. Lappi kaj S. K-nen kontraŭ ĝi. Vilkki eĉ proponis alternativojn ‘sŭom-’ aŭ eĉ ‘svom-’ por konservi la unusilabecon de la radiko. Fakte ‘suomo’ en esperanto ja estas trisilaba vorto: su-o-mo.

Vilkki rakontis, ke la radikon ‘suom-’ rekomendis al li en jaro 1940 norvega parokestro Pedersen el Vardö (Vuoreija). Kvankam la vorto ne estas internacie konata, tiu manko foriĝos rapide se ni mem uzas la vorton en nia eksterlanda korespondado, li diris. ”Jam nun multaj alilandaj Esperanto-vortaroj akceptis tiun radikon kaj ’Scienca Revuo’ ĝin uzas jam dek jarojn tute konsekvence”, argumentis Vilkki. Tamen ankaŭ Scienca Revuo neniam uzis la vorton Suomio en la listo de naciaj delegitoj de la asocio, kiu eldonis la revuon (kaj plej ofte la vorto Finnlando aperis en tiu gazeto ĝuste tie).

L. I. Lappi miris la argumenton de Kostiainen: se pro aludo al akno estas problemo, necesus ŝanĝi ankaŭ vortojn ”paska” (aludo al finna vorto pri fekaĵo) kaj ”persekuti” (aludo al postaĵo). Li emfazis ke ”ni uzu ĉiam en la internacia lingvo esprimojn, kiuj estas plej internaciaj kaj

plej vaste komprenataj. Ni ne estu lingvaj ŝovinistoj”.

### Defendo de tradicia uzo

Vilho Setälä publikigis en Esperanta Finnlando 7/1964 artikolon kun titolo ”Pri la nomo de nia popolo kaj lando” en kiu li defendis tradician uzon de formo ”Finnlando” kaj opiniis ke la emo ŝanĝi la nomon de la lando estas ia ”stranga, malfrua frukto de ”purfinnismo” inter la esperantanoj”.

Vorto Suomio aperis ankaŭ en aliaj artikoloj de Esperanta Finnlando, i.a. kiam Hemmo Tietti varbis abonojn por Heroldo de Esperanto, sed ĝenerale la skribantoj uzis la vortojn finno kaj Finnlando.

La plej lasta debato pri la temo okazis en Esperanta Finnlando 2/1965 kiam Hemmo Tietti skribis pri ĝi. SR (Simo Raumavirta) respondis, ke ni jam antaŭe decidis, ke pri la landnoma demando suom/fin ni ne plu diskutos en nia gazeto. Tamen, ĉar kelkaj samideanoj nepre volis doni pliajn vidpunktojn, ni cedis. Estas fatale, ke oni kun tioma fanatikeco defendas opiniojn, kiuj estas tute sensignifaj”. Raumavirta avertis, ke la diskuto ”forigas laborpacon kaj unuecon el la vicoj esperantistaj.”

Vorto Suomio aperis ankoraŭ kelkfoje en Esperanta Finnlando, sed iom post iom la aktivuloj de la nova vorto cedis. En artikoloj de Joel Vilkki kaj Hemmo Tietti la vorto Suomio aŭ suoma aperis konsekvence, aliaj ĝin ne uzis, sed ankaŭ ne protestis. La uzo de Suomio restis tro malgranda por serioze konkurenci kun Finnlando. Post la fino de 1960-aj jaroj la ĝenerala uzo pli kaj pli favoris la tradician formon. Ekde tiam Finnlando fariĝis la sola uzata formo ankaŭ en internaciaj esperantaj gazetoj. Nuntempe Suomio aperas en interreto multe pli ofte ol en la gazetaro kaj en interreto ĝin uzas foje ankaŭ iuj finnoj. Tio eble atestas pri la pli granda variado en lingvaĵo en la reto kaj pri la malpli granda socia premo uzi la tradiciajn, ĝenerale akceptitajn formojn.

### La finnoj diras Finnlando

La uzo de finnoj mem estis la decida kialo, kial la nomo de la lando fariĝis Finnlando kaj restis tia en Esperanto. La uzo de landaj esperantistoj havas plej multe da potenco en la decido de landonomo en Esperanto: la landanoj mem uzas la nomon de sia lando pli ofte ol aliaj kaj ĉar la plej ofta uzo decidas, la forta kaj unueca opinio de landanoj mem estas la decida faktoro. Ĉar granda plimulto el finnoj (pli ol 98 %, se fidi al la enketo en 1960) ne volis ŝanĝon, ĝi ne havis eblecojn pluvivi.

En 1980-aj jaroj la vorto Suomio aperis pli ofte en buŝoj kaj skribiloj de eksterlandanoj. IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj) uzis ĝin aktive, sed inter ĝiaj membroj estis malmultaj finnoj. Foje la vorto aperis en junularaj renkontiĝoj, ĝi ne vekis protestojn inter finnoj, sed ili ankaŭ ne komencis mem uzi ĝin. Unu argumento kontraŭ ”finno” estis la duobla ’n’, kiu estas malfacile prononcebla kaj ”finno” fariĝis distingilo de fenomeno, kiun oni nomis ”nonologismo”. Nome la vorto finno eble estas la plej ofta kaj la plej malfacile evitebla el vortoj kun du samaj konsonantoj sinsekve. Kontraŭuloj inventis eĉ vortojn, kie rezultus triobla n: finnnupto, finnnaskiĝo, sed ilia artefariteco estis okulfrapa. Estis proponita, ke suomo povus signifi finnlingvan finnlandanon dum finno signifus ĉiujn finnlandanojn. Tamen ne estis multe da bezono por tia distingo.

Tute alia sorto de la etne-devenaj landonomoj okazis en kazoj, kiam la landanoj mem estis grandparte por ilia uzo en Esperanto. En 1968 kiam okazis Universala Kongreso en Madrid, Hispanio, oni ankoraŭ uzis la vorton ”vasko” por popolo, kiun ni nuntempe konas kiel ”eŭskoj”. La gazeto de Eŭska Esperanto-Ligo nomiĝas La Eŭska kverko kaj neniu eksterlandano (aŭ hispano) protestas pro la uzo de formo ”eŭska” kaj apenaŭ iu plu uzas la formon ”vasko”. Same pri Koreio kaj Ukrainio: la loka uzo decidas, eĉ kontraŭ akademiaj rekomendoj.

*Jukka Pietiläinen*

# Tempo forgesigas, kiu memorigas?

## *Martti Putaala, esperantisto en la unua duono de la 20a jarcento*

Artikolo en Helsingin Sanomat (16.2.2007) vekis diskutadon en la retgrupo EAF-agadas. La diskuton partoprenis i.a. Harri Laine, Auli Vihermä kaj Osmo Buller. Jen resumo.

En 1938 surteriĝis en Kärsämäki balonoj elsenditaj de Nederlando. Pro tiu evento, Kärsämäki nun deziras krei turisman allogaĵon, precipe por nederlandanoj, kiuj multnombre veturas al Laponio tra Kärsämäki. En la origina balona afero envolviĝis Esperanto pere de la tiama ”Esperanto-konsulo” de Oulu, Martti Putaala (1896-1957). Li deziris surprizi la sendintojn per salutoj el Oulu. Kune kun la redakcio kaj presejaj laboristoj de la gazeto ”Kaleva” li al Nederlando sendis fotoalbumon provizitan per 18 subskriboj de la personaro de ”Kaleva”, la kartetojn origine fiksitajn al la balonoj, mapon, priskribon pri Oulu, leteron en Esperanto kaj eltondaĵojn el la pri-balona artikolo aperinta en ”Kaleva”, kompreneble tradukitajn en Esperanton. Dank’ al tio la balon-afero, pere de Esperanto, iĝis mondfama kaj okupis lokon en nederlanda gazetaro.

Kiu estis tiu aganto de EAF kaj kial oni ŝerce nomis lin Esperanto-konsulo? Iom pri li rakontas Allan Mehtonen en sia libreto “Sata vuotta kieltä toivomielellä” (aperis en 1987). En Esperanta Finnlando en 1922 aperis propra rakonto de Putaala pri tio, ke li estis jam plurjara esperantisto sed ankoraŭ neniam parolis Esperanton kun nefinno. Esperante renkonti iun esperantiston li kutimis promenadi en la haveno de Oulu kun verda stelo sur la brusto, kaj fine okazis, ke iu nederlanda maristo alparolis lin en Esperanto! Tial estis tute nature por Putaala skribi al Nederlando en Esperanto. Kaj li pravis, la ricevantoj de la sendaĵo komprenis ĉion. La lernantinoj kiuj sendis la balonojn okaze de naskiĝo de princino Beatrix havis instruistinon kiu organizis klubon de Esperanto en sia lernejo.



*Martti Putaala, foto el la libro de Allan Mehtonen “Sata vuotta kieltä toivomielellä: Esperanton harrastusta Oulussa 1890-luvulta lähtien”, 1987.*

Martti Putaala estis agema, gaja, sincera esperantisto. Liaj noveloj troveblas dise en la tiama E-gazetaro. En la historio de KELF, kompilita de Olavi Kantele, troveblas lia pia kaj puranima poemo pri la preĝo Patro Nia. Ofte li uzis la pseŭdonimon Kamemoro, sub kiu li en 1947 verkis korespondan rakonteton pri finna knabo kaj brita knabino kiel lernomaterialon kunlabore kun Vilho Setälä, kiu en la antaŭparolo skribas, ke eblas plene kompreni ĝin, se oni posedas 500 bazajn E-vortojn kaj konas la plej kutimajn 50 finaĵojn kaj afiksojn. Setälä rekomendas la rakonteton “Mary kaj Sulo” kiel la unuan facilan legaĵon al novaj esperantistoj.

Martti Putaala estis unu el la fondintoj de la hejmregiona societo Oulu-Selskapi kaj fervore kolektis kaj konservis oŭluajn historion kaj dialekton. En siaj kolumnoj en “Kaleva” li ofte menciis Esperanton.

*el diversaj fontoj kompilis Saliko*

*Mi bedaŭras, ke mi ne sciis pri Putaala kiam mi sendis informojn por “Ordeno de la verda plumo”, leksikono aperinta en 2006. Estus tempo elrasti sciigojn kaj memorojn el la rapide forgesata pasinteco.*

# La angla venkis en kantokonkurso

Post tutlanda telefona baloto, en kiu estis donitaj pli ol du milionoj da voĉoj, anglalingva kanto denove estis elektita por reprezenti Svedion en la ĉiujara eŭropa kantkonkurso de Eurovision. El la dek kantoj kiuj partoprenis la svedan finalon la 10-an de marto, ses estis anglalingvaj. La kvin pintajn lokojn en la konkurso kaptis anglalingvaj kantoj.

La anglalingviĝa tendenco en la kantkonkurso de Eurovision fakte estis enkondukita de Svedio jam en la jaro 1965 per la kanto ”Absent Friends”. Tiam Eŭropo ŝajne ankoraŭ ne estis preta por la angliĝo de la scenejo. Tuj post la unua sveda provo estis enkondukita nova regulo, laŭ kiu la kantoj devis esti prezentitaj en oficiala lingvo de la lando kiun ili reprezentis. La regulo validis ĝis la jaro 1972, kaj denove en la jaroj 1978-1998.

Ekde la jaro 1999 do validas la reguloj de la libera merkato. Kaj ekde la jaro 1999 ĉiuj kantoj, kiuj reprezentis Svedion en la konkurso, estis prezentitaj en la angla. Simila evoluo okazis ankaŭ en Finnlando, tamen kun unujara prokrasto: la lasta finnlingva kanto reprezentis Finnlandon en la jaro 1999.

Do, almenaŭ en Svedio kaj Finnlando la angla lingvo jam atingis sian finan venkon en la branĉo de eŭropa kultura konkurado. Kompreneble multaj kantistoj por interna uzo daŭre prezentas en la sveda kaj en la finna, kaj precipe en Finnlando la propralingvaj kantoj havas tre fortan pozicion en la interna merkato. Sed por ekstera uzo ili evidente ne taŭgas.

Oni povus aserti, ke kantoj por internacia publiko devas esti en la angla por esti komprenataj, sed ĝuste en la kantkonkurso de Eurovision tiu argumento apenaŭ validas. La kantoj ja reprezentas diversajn landojn kun supozeble malsamaj kulturoj. Se la enhavo de la tekstoj vere gravus, estas bagatelo anticipe aranĝi, ke ili estu tradukitaj al lokaj lingvoj kaj aperu kiel subtekstoj



***Hanna Pakarinen reprezentos Finnlandon: ”Leave me alone”.***

sur la ekrano – tio ja okazas en finna televido, sed ne en Svedio.

Ne, la ĉefa kialo de la angliĝo estas alia: la populara kulturo ĉiam pli estas la ĉeftereno de la angla lingvo. Kion oni kantas ne tre gravas, se nur oni kantas en la angla – eĉ banalaj tekstoj povas ŝajni profundaj, se oni kaptas nur unu vorton el tri. Anglalingvanojn tro malbona prononco supozeble povas ĝeni, sed tio estas la prezo, kiun ili devas pagi pro la tutmondiĝo de la angla.

Iun tagon mi veturis hejmen de laborejo kun kolego, kaj li petis min ŝalti muzikon en la aŭto. Mi aŭdigis al li kelkajn kantojn de mia kompaktdisko kun miksa koktelo, kaj antaŭ unu kanto mi preterpase diris, ke temas pri sveda bando. Li ĝue aŭskultis la rokaĵon, sed kiam mi tuj poste demandis al li, en kiu lingvo ĝi estis prezentita, li ne povis respondi.

Li rebutonumis al la kanto, aŭskultis, aŭskultis, prave rekonis iujn latinidajn ecojn, sed ne povis diveni la lingvon, kvankam li bone scias, ke mi estas esperantisto. Belorusa? Samea? Kiam mi rakontis, ke la kanto estis ”Liza pentras bildojn” de la sveda bando Persone, li estis komplete surprizita – tio ne taŭgis kun lia mondobildo. Li ne pensis, ke povas ekzisti serioza muziko en Esperanto.

Kian ŝancon havus do esperantlingva kanto en la konkurso de Eurovision? Supozeble oni parolus nur pri tio, ke la kanto estas en Esperanto, kaj tute ne aŭdus la muzikon. Se kanto estas en la angla, oni aŭdas la muzikon, kaj tute ne pensas, en kiu lingvo ĝi estas kantata. La angla venkis – almenaŭ tiuterene.

*Kalle Kniivilä*

## Teuvo Alavillamo Aganto de la jaro 2006

EAF nomumis Aganton de la jaro pro ke:

"Teuvo Alavillamo faris grandan kontribuon al Esperanto tradukante projektojn de la organizaĵo E@I al la finna lingvo. E@I, kiu signifas Esperanto, aŭ Edukado, ĉe Interreto, naskiĝis kiel laborgrupo kadre de TEJO kaj ekde 2005 ĝi estas registrita organizaĵo en Slovakio. Teuvo faris la finnlingvajn versiojn interalie de Lingva Prismo – paĝaro por kaj pri lingvoj, finne "Sivusto kielistä ja kielten puolesta" *www.lingvo .info* kaj de la ampleksa paĝaro *www.lernu.net* per kiu eblas informiĝi pri Esperanto kaj lerni ĝin senpage. Li tradukis la tekstojn de la DVD Esperanto Elektronike, kiu enhavas ankaŭ la informan filmon "Esperanto estas ...", finne "Esperanto on ...".

En Lernu estas ĉ. 400 registriĝoj de Finnlando inter kiuj pli ol 100 estis aktivaj dum 2006. Teuvo estas lingvohelpanto de Lernu. Li korektas la korespondekzercojn de lernantoj por la kurso *Ana Pana*. Pasintjare 16 lernantoj sendis siajn respondojn al la finnlingva lingvohelpanto.

EAF volas inspiri al plua aktiva agado per la sekva donaco:

– la libro *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* de Bertilo Wennergren

– du varoj laŭ propra elekto de la libroservo de EAF.

En Vintraj Tagoj de EAF en Kotka, la 11an de marto 2006

*Anna Ritamäki, prezidanto*

*Tiina Oittinen, sekretario*".




## Gvidilo pri taksado de lingvo-akirado

Fine de januaro aperis ĉe UEA informkajero "La Komuna Eŭropa Referenckadro: Pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj." (ISBN 978 929017095 2, redaktis Katalin Kováts)

La kerno de la 24-paĝa kajero estas traduko de la unua ĉapitro el plurcentpaĝa libro eldonita de la Konsilio de Eŭropo kaj konsiderata la plej baza kaj grava dokumento en la eŭropa lingvoinstrua medio. En la kajero troviĝas ankaŭ la memtaksaj tabeloj de la Referenckadro kaj artikolo pri la uzo de la Europass-sistemo.

UEA kaj ILEI celas diskonigi la enhavon kaj la signifon de la Referenckadro, informi pri sia kunlaboro kun la Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo kaj indiki la paŝojn por ebligi al la monda esperantistaro pli bonkvalitajn kaj modernajn lingvouzajn kondiĉojn. La esperantistaj fakuloj pri lingvoinstruado nun alfrontas la defion oficiale kaj konsekvence apliki la novan skalon kaj la koncernajn terminojn, kaj ellabori kaj akreditigi novan, laŭnorman ekzamensistemon de UEA kaj ILEI.

La broŝuro "La Komuna Eŭropa Referenckadro" estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA por la prezo 3,00 eŭroj. Ĝi estas ankaŭ rete elŝutebla ĉe *www.edukado.net* .

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Claude Piron en junia Malferma Tago

Claude Piron, unu el la plej popularaj Esperantaj verkistoj kaj oratoroj, prelegos en la venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 2-an de junio. Estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo varmos la tutan tagon, de la 10-a ĝis la 17-a horo.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## ”Vojaĝo” plejfuroris ankaŭ en 2006

”Vojaĝo en Esperanto-lando” de akademiano Boris Kolker konkeris la unuan lokon en la vendostatistiko de la Libroservo de UEA en 2006, jam por la kvina sinsekva fojo. Kun 272 ekzempleroj tre bone startis la vendado de la diskutinstiga verko de Humphrey Tonkin, ”Lingvo kaj popolo”, aperinta jarmeze.

Libroj el aliaj eldonejoj ol UEA inter la dek plej venditaj estis nur “Gerda malaperis!” de Claude Piron kaj “Plena manlibro de Esperanta gramatiko” de Bertilo Wennergren, kiu post multjara konsultebleco en la reto fariĝis alirebla ankaŭ en presita formo.

La vendoj sumiĝis je 133 919 eŭroj, kio estas 4,6% pli ol en 2005. La Libroservo vendis entute 2459 diversajn titolojn, kvankam de plej multaj el ili nur po 1 aŭ 2 ekzemplerojn. Plimalpli same multe da aliaj titoloj ne altiris klienton. La dek plej venditaj:

347 “Vojaĝo en Esperanto-lando”, legolibro de B. Kolker, EUR 18,00
322 “Pasporta Servo”, listo de gastigantoj, EUR 15,00
272 “Lingvo kaj popolo”, esearo de H. Tonkin, EUR 14,10
186 “Saluton!”, lernolibro de A. Childs-Mee, EUR 10,80
161 “Sed homoj kun homoj”, eseo de Z.M. Sikosek, EUR 16,50/22,50
143 “Internacia Kongresa Universitato 2006”, red. A. Wandel, EUR 12,90
131 “Gerda malaperis!”, facillingva romaneto de C. Piron, EUR 5,70
123 “Etimologia vortaro de la propraj nomoj”, A. Cherpillod, EUR 19,50
118 “Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj”, eseo de M. Boulton, EUR 1,80
108 “Plena manlibro de Esperanta gramatiko”, B. Wennergren, EUR 27,00

*(el komuniko de UEA redaktis mm)*

## Komitatanoj B rekte elektitaj

Kvin kandidatoj sin anoncis por la elektado de komitatanoj B, kiuj reprezentas la individuajn membrojn en la supera organo de UEA. Ĉar fine de la jaro 2006 la individuaj membroj de UEA nombris pli ol 6000, povis esti elektotaj sep.

La kvin komitatanoj B, kies oficperiodo komenciĝos je la unua tago de la 92-a Universala Kongreso estas Marija Belošević (Kroatio), Tomasz Chmielik (Pollando), Johan Derks (Nederlando), István Ertl (Luksemburgio) kaj Jukka Pietiläinen (Finnlando). Belošević, Ertl kaj Pietiläinen membras ankaŭ en la nuna Komitato elektita en 2004.

Laste la komitatanoj B estis elektitaj sen poŝta balotado en 1992. Pri la ses lokoj de komitatanoj B en la nun deĵoranta Komitato konkursis antaŭ tri jaroj 16 kandidatoj. Voĉdonis tiam 1491 membroj, t.e. 31,4%.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Corsetti vizitis en Herzberg

Laŭ invito de la Interkultura Centro Herzberg (ICH), la prezidanto de UEA. d-ro Renato Corsetti, de la 12-a ĝis la 14-a de marto oficiale vizitis Herzberg Harz (centra Germanio), unuanime proklamita de la urbestraro *la Esperanto-urbo*.

La urbestro de Herzberg, Gerhard Walter, kunvokis en la urbodomo honore al la vizitanto specialan laborkunsidon kun akcepto, en kiu partoprenis kaj la lokaj skabenoj kaj la gvidantoj de ICH. En tiu cirkonstanco la urbestro konfirmis la pluan subtenon de la urbo al la internacia agado de ICH, dum la prezidanto de UEA emfazis la varman apogon de la monda asocio de la esperantistaro al la dirita agado kaj anoncis, ke ĝi ricevos la oficialan aŭspicion de UEA. Post la kunsido, la urbestro regalis la esperantistan delegacion per tagmanĝo kaj samtage ĉeestis ▷

kun diverspartiaj politikistoj alian plurhoran kunvenon en la sidejo de ICH.

La loka gazetaro substrekis, ke la Esperanto-Centro Herzberg jam de kelkaj jaroj akiris grandan reputacion pro siaj sukcesoj rilate al publika apliko de la internacia lingvo en la urbo, ĝemeligita al Gora (Pollando). Kiel konate, Herzberg tutjare ofertas fak-seminariojn, studsesiojn, pedagogiajn tagojn kaj vintrosemajnojn, krom sennombraj Esperantaj kursoj por lernejanoj kaj plenkreskuloj.

*Informoj: http://ic-herzberg.de*

## La speso estus centjara

En 1907 unu el la grandaj ĝenevaj pioniroj, René de Saussure, elpensis internacian monunuon, la "esperanton" de la valutoj. Li nomis ĝin speso, asonance al *spezi*, la franca espèce, la hispana peso. El tiu ideo (kaj neologismo) ĝermis en Londono la Ĉekbanko Esperantista de H. F. Höveler: konkreta servo al la esperantistaro, sukcese funkcianta ĝis la unua mondmilito, kiel privata banko. Esperanta mono reaperis post la dua mondmilito, iniciate de Universala Ligo: la stelo, tamen sen esperanta banko.

Sabaton la 28an de aprilo 2007 Kultura Centro Esperantista dediĉos studotagon al la temo *De la speso ĝis Pro Esperanto: kia la mikrokredito en Esperantio?*, prelegos prof. Giorgio Silfer en la Esperanto-Domo de Ĉaudefono en Svislando. Dimanĉon la 29an matene okazos la ĝenerala Asembleo de LF-koop.

*(el HeKo koncizigis mm)*

## Virina Tago en Hiroŝimo

Al la Virina Tago de japanaj pacdefendantoj venis pere de Esperanto 158 mesaĝoj el 50 landoj. Ili estis ekspoziciataj en marto kaj presitaj en broŝuro disdonita al 330 partoprenintoj, tradukitaj en la japanan. Ili aperos en nova ekspozicio en oktobro dum la tutlanda konferenco de japanaj virinoj.

*sciigis OSIOKA Taeko/Saliko*

## Veterana Esperantista Klubo (VEK)

La kriterio por membreco en VEK estas minimume 40-jara esperantisteco; tia membro nomiĝas veterano. Membro kun minimume 50-jara esperantisteco nomiĝas jubileano kaj la membro kiu esperantistiĝis plej frue estas la dojeno de VEK.

Kvankam VEK estis fondita en 1949 ĝi pasivas jam de pluraj jaroj. Pro tio oni decidis provi reaktivigi ĝin kun novaj, utilaj celoj: krei arkivon de homoj kies profundaj spertoj pri la lingvo kaj la movado povas esti utilaj por doni informojn kaj konsilojn al la nunaj gvidantoj de la movado kaj ties historiistoj.

Ĉiuj kvalifikitaj homoj estas invitataj membriĝi en VEK. Kvankam la kotizo estas libervola, la rekomendita sumo egalas al tiu de Membro kun Gvidlibro de UEA en la koncerna lando.

Bonvolu anonci vin al UEA kiu sendos al vi enketilon/aliĝilon.

Retadreso: <*uea@co.uea.org*>

*inf: WRHarmon@aol.com*

## UEA:n jäsenmäärä väheni hiukan

Kansainvälisen esperantoliiton (UEA) jäsenmäärä väheni jonkin verran vuonna 2006, kun järjestö kirjasi 6066 yksilöjäsentä ja 11 732 liitännäisjäsentä. Vuoden 2005 luvut olivat 6107 ja 12 253.

Pienempi jäsenmäärä oli odotettavissa jo heinäkuisen maailmankongressin perusteella, sillä kongressissa oli nyt vähän vähemmän osallistujia kuin edellisvuonna ja lisäksi nyt suurempi osa kongressin osallistujista oli muutenkin UEA:n jäseninä.

*(UEA:n tiedotteesta toimitti mm)*

lernu!
hymyile ja opi!
@ www.lernu.net

# Estraro kunvenis

**La estraro kunvenis (1/2007) 10.2.07** ekde 12.05 kadre de la AKK-projekto en la oficejo. Ĉeestis AR, TO, BE, TH, PS, MS, TP, RP kaj la kasisto.

La estraro traktis la situacion pri subvencipetoj ligitaj al la jubilea jaro, de kiuj neniu respondo ankoraŭ troviĝis. Kelkaj pliaj petoj estas preparataj. Kulturgazeta subtenpeto de EF por 2007 devas esti sendita al edukministerio ĝis fino de februaro. [La sekretario prizorgas la peton de 2 000 e laŭ la estrara decido. Kutime ni ricevis 1 000 eŭrojn]. Monpetoj estis senditaj al Suomen Kulttuurirahasto [ne donis, sed ni sendis novan peton al la regiona fondaĵo Pohjois-Savon rahasto fine de februaro], al Svenska Kulturfonden [21.3. venis informo pri 6 000 eŭroj por la jubilejara temo “Pluraj lingvoj praktike”] kaj al FES [13.2.07 12 000 eŭroj por la jubilea jaro].

La lupago de stokejo ĉe Vapaa-ajattelijat (Neljäs linja) altiĝis de 480 e al 500 e/jaro.

La estraro diskutis pri la propono de Pentti Makkonen pri pli da finnlingvaj tekstoj en EF kaj pri kampanjo al bibliotekoj (aperis en EF 1/07) kaj konstatis ke estas utile ricevi komentojn de la legantoj. La estraro konsideras bona la ideon varbi pli da bibliotekaj abonantoj, sed povas esti malfacile trovi la fortojn realigi ĝin konsiderante la multajn urĝajn farendaĵojn dum la jubilea jaro. Presejo en Tampere sendis oferton pri presado kaj poŝtigado, kiu aspektas favorkosta. La estraro petas la redaktan grupon pluesplori la alternativon.

La estraro traktis la preparojn de Vintraj Tagoj en Kotka kun jarkunveno. La estraro konstatis, ke ĉi-jare en la jarkunveno estas elektojaro por la estraro de Propra Ejo (ĉiun 3an jaron). La nunaj estraranoj elektitaj en la jarkunveno estas Anna-Liisa Heikkinen kaj Harri Laine. [Ili estis reelektitaj en Kotka. La estraro estas tripersona kun Jukka Laaksonen elektita de la EAF-estraro. La estraro superrigardas ke la mono kolektita por havigi propran ejon estas investita en la oficejo.]

Por Aganto de la jaro 2006, kiu estos anoncita lige al la jarkunveno, venis kelkaj proponoj.

Lige al la jubilea tago en Helsinki 28.4.2007 la estraro konstatis ke la prezidento de Finnlando promesis esti alta protektanto de la jubilea jaro. Prototipa leterpapero kun EAF-logotipo estis uzita, kiam EAF invitis la prezidenton Tarja Halonen esti alta protektanto.

La estraro notis la cirkuladon de la jubilea skatolo kaj traktis la programajn planojn por la vizito de Renato Corsetti kaj la jubilea tago. Kviza urbopromeno okazos antaŭtagmeze, la laborgrupon estras Carola Antskog. Por la prezentado de la Nobelara domo la ĉiĉerono estos Ulla Salonen. [24.2 realiĝis prepara vizito al la domo kun ĉiĉerono por ŝi kaj lokaj esperantistoj.]

La estraro konfirmis prezon 15 e/persono por la ĉefa festo en la Nobelara domo, sed decidis okazigi la vesperan bankedon en restoracio kaj fiksi la prezon laŭ takso de la realaj kostoj kun programo [70 e]. La estraro decidis sendi, krom al ĉiuj membroj pere de EF, invitojn al la jubilea festo al kelkaj personoj kaj asocioj.

Pri Arta Lumo en Kuopio la estraro konstatis ke venis iuj aliĝoj. La aliĝilo kaj informoj pri tranokteblecoj kaj ekskursoj troviĝas en la reto [kaj nun aperis ankaŭ en EF]. Traduko de la informoj pri Kuopio estas planata. La estraro ankaŭ konstatis la planojn pri la somera kurso en Valamo kun ŝipekskurso al Kuopio.

La estraro konfirmis la januaran retpoŝtan decidon, ke aperu anonco en la Jarlibro.

La estraro konstatis ke ankaŭ FEJO havos jubilean jaron 2007 kaj fariĝos 30-jara. Mikko Mäkitalo sendis inviton al Turku por festi proksime al la fondodato, kiu estis 26.2.1977. [Okazis eta festo 25.2. kaj alia festo dum FEJO-semajnfino 24-25.3. EAF donacis unu senpagan partoprenon en la jubileaj festo kaj bankedo.] ▷

Steleto petis al EAF verki artikolon okaze de la jubilea jaro por la blindula gazeto Kajastus. Respondecos pri la realigo de la artikolo AR kun RP.

Aliajn aferojn, ekz. la proponon de UEA festi la tagon de gepatraj lingvoj la 21an de februaro, la estraro ne pritraktis pro tempomanko.

**La estraro kunvenis (2/2007) 10.3.07** je 17.20-17.45 sub la gvido de la vicprezidanto en Hotelo Seurahuone, Kotka, ĉeestis PS, TO, TG, TH, RP kaj MP.

La estraro decidis prezenti la agadraporton, financan raporton, agadplanon kaj buĝeton al la jarkunveno. La estraro decidis nomumi kiel aganton de la jaro 2006 Teuvo Alavillamo [la diploman tekston kaj bildon ni publikigas aliloke ĉi-numere]

La estraro informiĝis pri la planata traduko al Esperanto de la paĝaro de la movado *Roska Päivässä*. La estrarano de UEA por landa agado planas viziton al Svedio proksime al la jubilea tago de EAF. La tria eldono de lernolibro Forsman–Pyhälä *Egaleco kaj paco per Esperanto* aperis ĵus antaŭ Vintraj Tagoj. Temas pri represo de la dua eldono sen ŝanĝoj.

**La nova estraro kunvenis (3/2007) 11.3.2007** je 14.30-14.45 en Hotelo Seurahuone, Kotka, ĉeestis AR, TO, TG, TH, JL, PS.

La estraro elektis ĝis la sekva jarkunveno kiel vicprezidanton Päivi Saarinen kaj kiel sekretarion Tiina Oittinen. Krome la estraro konstatis, ke kiel kasisto daŭrigas Tiina Kosunen kaj kiel librotenisto Paula Niinikorpi, ambaŭ ekster la estraro.

La estraro decidis mendi proprajn poŝtmarkojn, tn. omakuva-postimerkki (memdesegnita kaj financita) kaj rajtigis la prezidanton antaŭenigi la aferon, kostoj por EAF 1,25-1,30 e por ĉiu marko + sendokostoj (1-klasa valoro 0,70 e ĉe poŝtigado). La estraro fiksis la vendoprezon je 1,50 e.

La estraro decidis pri sekva kunsido 31.3. 2007 en la oficejo.

# Eventokalendaro de EAF

**Jubilea jaro 2007**

28.4.2007 Jubilea tago, Helsinko: urba programo, jubilea festo, jubilea bankedo
26–27.5.2007 Maailma kylässä – Mondvilaĝa festivalo, Helsinko (budo de FEJO/ EsperHe)
23–27.7.2007 Esperantokursoj – Esperantokurssit (Valamon kansanopisto)
26–27.7.2007 Antaŭekskurso de monaĥejo ĝis Kuopio
27.7–1.8.2007 Festivalo Arta Lumo, Kuopio
27.7–3.8.2007 Internacia Junulara Kongreso, Hanojo, Vjetnamio (TEJO)
4–11.8.2007 Universala Kongreso, Jokohamo, Japanio (UEA)
oktobro 2007 Simpozio "Finnlando, Esperanto kaj pluraj lingvoj praktike", Vaasa–Vasa
15.12.2007 Malferma tago en la oficejo, Helsinko

# Esperanto-societo en Turku, printempaj kaj someraj aranĝoj

La esperantokursoj en la Civitana instituto de Aurala finiĝos marde 17.4.2007. Tiam okazos kluba kunveno kune kun la kursanoj je 16.30-18.30. La tradiciaj kafejaj renkontiĝoj merkrede ĉ. inter 16.30 kaj 17.30 okazos ek de marto en la kafejo Sirius de la nova ĉefbiblioteko de Turku. En la biblioteko okazos ankaŭ la prelego de Renato Corsetti 27.4. Pli profunde ni konatiĝos en la nova ĉefbiblioteko en majo. En aŭgusto (22.8.) okazos ĉiĉeronata vizito al la ekspozicio pri la vivo kaj verkoj de Mikael Agricola en la muzeo Aboa Vetus. Vizitantoj estas ĉiam bonvenaj. Kontaktuloj: Tiina Oittinen (vidu p. 2) kaj Leena Tiusanen (tel. 02-2320542).

## Ekspozicio en Tampere pri Esperanto

Honore al la jubileanta 100-jara Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) Esperantosocieto Antaŭen aranĝos ekspozicion pri la internacia lingvo en la ĉefa biblioteko Metso en Tampere 16.4.-28.4.2007 kaj iom malpli grandan en la filia biblioteko de Sampola 13.8.-2.9.2007.

La ekspozicio havas tri temojn. La unua temo rakontas pri la historio kaj agado de EAF ekz. per fotoj el pluraj vintraj kaj aŭtunaj tagoj.

La dua temo estas la bonaj kaj malpli bonaj tempoj de la tamperea esperantoagado ek de la jaro 1905 pere de vortoj kaj fotoj. Ĉi tiu parto estas farita por la 90-jara Esperantosocieto en Tartu, ĝemelurbo de Tampere en Estonio.

La tria temo rakontas pri vojaĝoj de tampereaj esperantistoj hejmlande kaj eksterlande, fotoj el kongresvojaĝoj.

La ekspozicio estas plejparte finnlingva, ĉar ĝi estas celita por finnoj. Nur en la dua temo aperas esperantlingvaj tekstoj.

La ekspozicion konstruis Veli Hämäläinen kun helpo de Sylvia Hämäläinen.

## Esperantonäyttely Tampereella

Esperantoseura Antaŭen järjestää 100-vuotiaan Suomen esperantoliiton (EAF) kunniaksi kansainvälistä kieltä esittelevän näyttelyn Tampereen pääkirjasto Metsossa 16.4.-28.4.2007 ja supistettuna Sampolan sivukirjastossa 13.8.-2.9.2007.

Näyttelyssä on kolme teemaa. Ensimmäinen teema esittelee EAF:n historiaa ja toimintaa mm. valokuvin useista talvi- ja syyspäivistä.

Toinen teema kertoo sanoin ja valokuvin Tampereen esperantotoiminnan nousuista ja laskuista vuodesta 1905 lähtien. Tämä osa on rakennettu virolaisen ystävyyskaupunki Tarton esperantoseuran 90-vuotispäiväksi.

Kolmas teema on tamperelaisten esperantistien retkiä kotona ja maailmalla, kuvia kongressimatkoista.

Näyttely on tarkoitettu suomenkieliselle yleisölle ja siksi se on pääosin suomenkielinen. Vain toinen teema on myös esperantoksi.

Näyttelyn on rakentanut Veli Hämäläinen Sylvia Hämäläisen avustuksella.

## ELFI informas

Esperantoasocio de Finnlandaj Instruistoj ELFI havis sian jarkunsidon en Kotka la 10an de marto. Okazis sekvaj elektoj: prezidanto Carola Antskog, estraraj membroj Sylvia Hämäläinen, Aini Vääräniemi, Tiina Oittinen, Tuomo Grundström kaj vice Raita Pyhälä kaj Patrik Austin. En la sekvataga estrara kunveno estis elektitaj vicprezidanto Aini Vääräniemi, sekretario Sylvia Hämäläinen kaj kasisto Tuomo Grundström.

Membrokotizoj restas la samaj: MIPR 26 e (IPR papere), MJA 26 e (IPR rete + Juna amiko) kaj MI 13 e (IPR rete). Kontonumero estas nova: 445023-283606.

Tapio Sormunen estis nia kasisto dum pluraj, pluraj jaroj. ELFI kore dankas lin pro lia bona laboro.

*sekretario Sylvia Hämäläinen*

## Tervetuloa kevätretkelle la 26.5.

Jyväskylän Esperantokerho osallistuu Suomen Esperantoliiton juhlavuoden ohjelmaan järjestämällä perinteisen kevätretken **Vääksyn kanavan maisemiin**. Päivän aikana tutustumme Päijännetalon näyttelyihin, vesimyllymuseoon, vaellamme Aurinkovuoren jääkausipoluilla sekä muistelemme Vääksyn suosittuja esperanton kesäkursseja. Kaikki esperantoystävät ystävineen ovat tervetulleita.

Lisätietoja ja ilmoittautumiset Seija Kettuselle puh. 040 867 2743 tai *kari.kettunen@pp1.inet.fi*

★











# Esperanta Finnlando gratulas 30-jaran FEJOn

FEJO iĝis 30-jara organizo la 26-an de februaro 2007. Oni povis en Esperanta Finnlando dum paso de jaroj legi pri diversaj okazaĵoj de la junularo kaj sperti pli kaj malpli aktivajn periodojn en agado de FEJO. Ni esperas, ke ankaŭ venontaj jardekoj signifos novajn generaciojn de junaj esperantistoj, kiuj per siaj freŝaj ideoj skuos kadukajn pensojn kaj renovigos la Esperanto-movadon.

*Mikko Mäkitalo*







# FEJO ricevis novan prezidanton



*Mira Anonen, nova prezidanto de FEJO.*

Dum FEJO-semajnfino 23.-25.3. 2007 en Kimito/Kemiö FEJO i.a. havis sian jarkunvenon, kiu elektis novan estraron por la asocio. La estraro iom renoviĝis, ĉar venis kelkaj novaj personoj kaj iuj malnovuloj forlasis.

Nova prezidantino estas Mira Anonen. Estraranoj estas Patrik Austin, kiu prezidis de 2001 ĝis la jarkunveno, Andrei Dumitrescu, Elina Hallman, Mikko Mäkitalo kaj Paula Niinikorpi, vicestraranoj Katja Nuorvala, Timo Pirinen kaj Alia Sarhan.

La nova estraro ne jam kunsidis por ordigi sin, pro kio FEJO ne ankoraŭ havas ekz. oficialan sekretarion aŭ vicprezidanton. La estraro intencas kunsidi plej eble baldaŭ. Sekvu ttt-paĝojn de FEJO, la retliston de FEJO kaj ankaŭ ĉi tiun gazeton por informiĝi pri la elektoj!

La membrokotizoj por jaro 2007 estas 3 eŭrojn por ordinaraj membroj (sub 30-jaruloj) kaj 12 eŭrojn por subtenantaj membroj. La ordinaraj membroj povas ankaŭ aboni Esperantan Finnlandon je rabatita prezo 10 eŭroj. Membrokotizo kaj gazetabono pageblas al la konto de FEJO 563000-2213606 (Länsi-Suomen OP).

Retpoŝtadreso de FEJO estas *fejo@esperanto .fi* kaj ttt-paĝoj troveblas en adreso *www.esper anto.fi/fejo*. Ne hezitu kontakti, se vi interesiĝas pri FEJO aŭ vi havas demandojn!

*Paula Niinikorpi*



***Paula Niinikorpi, Patrik Austin, Timo Pirinen, eks-FEJO-prezidanto Anna Ritamäki, Andrei Dumitrescu kaj Alia Sarhan ĝuis la speciale preparitan kukon okaze de la 30-jariĝo.***

# Esperanto: Keinokieli, työkieli ja kuin äidinkieli

Esperanton määrittely tai asema kielenä ja kielien joukossa putkahti esiin muutamassa tämänkertaisessa lehtiartikkelissa. Asko Kyttä kommentoi yleisönosastossa Kansan Uutisissa (12.1.2007) esperantoa, että se ei ole keinokieli. Uudessakaupungissa ilmestyvän Vakka-Suomen Aluesanomien haastattelussa (7.3.2007) Tuomo Grundström arvioi, että hän puhuu esperantoa äidinkielen veroisesti. Turkulainen-ilmaisjakelulehden Lukijalta-palstalla (27.1.2007) Andrzej Pettyn kommentoi samassa lehdessä kaksi viikkoa aikaisemmin julkaistua Tiina Oittisen haastattelua ja totesi, että esperantoa käytetään monessa yhteydessä myös työkielenä eikä vain yhteiskielenä kansainvälisyyttä harrastavien ihmisten välisissä tapaamisissa ja keskusteluissa.

Tiinaa oli haastateltu Turkulaisessa 13.1. 2007, kun Turussa Auralan kansalaisopistossa oli ”Esittelyssä esperanto” -tapahtuma, kielen ja sen opiskelun esittely. Jutun mukaan esperanton kehittäjä Ludwik Zamenhof asui Puolan ja Liettuan rajaseudulla, jossa puhuttiin neljää kieltä. Siksi ihmiset eivät aina ymmärtäneet toisiaan. Esperantosta piti tulla idealistisesti koko maailmaa yhdistävä kieli, mutta maailman kaupallisen koneiston ansiosta englanti on saanut jalansijan kanssakäymisen kielenä.


Esperanton käytölle ei ole samanlaisia kaupallisia tarpeita, mutta siitä huolimatta sitä opiskellaan Japanissa, Kiinassa, USA:ssa ja Euroopassa. Tiina lähti itse työväenopiston kurssille 1983 tuttavan vetämälle kurssille ja sen jälkeen kesällä nuorison maailmankongressiin. ”Innostuin lisää, kun näin ihmisten oikeasti puhuvan esperantoa.” Hän sanoi esperanton olevan systemaattinen kieli, jota oppii hyvin myös sellaiset henkilöt, jotka eivät mielestään ole kieli-ihmisiä. Vieraat ihmiset pitävät esperantoa usein espanjana, kun kuulevat sitä puhuttuna.

Jutun kuvituksena oli valokuva, kaksoismuotokuva Tiina Oittisesta ja Ludwik Zamenhofista, joka oli Tiinan edessään pitämän *La ondo de esperanto* -lehden kannessa.

Andrzej Pettyn esitti oman arvionsa esperantosta Turkulainen-lehdessä Tiina Oittisen haastattelun perusteella. Pettyn on toiminut Puolan radion toimittajana esperantotoimituksessa yli 40 vuotta. Hänen mukaansa esperanto on paitsi helppo kieli, myös elävä, kun sitä käytetään esperantokonferensseissa sekä myös eri ammattiryhmien ja uskontokuntien kokouksissa. Kiinassa sitä käytetään tiedeakatemian kokouksissa ja julkaisuissa. Taloustieteen Nobelin palkinnon 1994 saanut Reinhard Selten on julkaissut kirjoituksiaan esperantoksi. Lehtiä ilmestyy tällä kielellä yli 300 ja sillä on kirjoitettu musiikkia, jota julkaistaan CD-levyinä.

Pettynin mukaan esperanton leviäminen on maailman mitassa hidasta mutta vakaata. Pienten maiden kansalaiset tiedostavat yhä useammin, että ihmisten perusoikeuksiin kuuluu vapaa ja mutkaton kansakäyminen yli kansallisuusrajojen.

”Tuomo puhuu esperantoa kuin äidinkieltään” otsikoi Uudenkaupungin ilmaisjakelulehti Vakka-Suomen Aluesanomat Tuomo Grundströmin haastattelun. Lisäotsikossa mainittiin myös EAF:n satavuotisjuhla. Jutussa esperanto nimetään ”kaikkien aikojen puhutuimmaksi tietoisesti keksityksi kieleksi”. Siitä kaavailtiin latinan kal-



*Tuomo Grundström respondece agas. Li estis intervjuita, artikolo aperis kaj li prizorgis ke ĝi nun troviĝas en la oficejo por esti citita en la Muut lehdet-kolumno. Dankon al ĉiuj sendantoj de eltondaĵoj aŭ kopioj.*

taista maailmankieltä. Kielestä ei tullut valtakieltä, vaan harrastajien yhteiskieli kaikkialla maailmassa. Tuomo on eräs näitä esperanton harrastajia.

Aluesanomien mukaan kieli on nyt ajankohtainen, kun Suomen esperantoliitto täyttää tänä vuonna 100 vuotta. Tuomo arvioi, että kieltä harrastavat kulttuuri-ilmiöistä ja kansainvälisyydestä kiinnostuneet ihmiset. Hän osaa myös latinaa, englantia, ruotsia ja saksaa, mutta vain esperanto sujuu samalla tavalla kuin äidinkieli.

Jutussa kerrotaan EAF:n 100-vuotisjuhlasta, siitä, että presidentti Tarja Halonen on sen suojelija ja että pääjuhla on huhtikuussa Helsingissä. Heinäkuussa Kuopiossa järjestetään esperanto-kulttuurifestivaali. Syksyn ohjelmassa on kielipoliittinen seminaari Vaasassa.

Tuomo Grundströmin mukaan esperanton selkeys ja johdonmukaisuus antaa kielelle vapautta, jota ei välttämättä ole idiomeja sisältävissä kansallisissa kielissä.

Kansan Uutisten yleisönosastossa Asko Kyttä kommentoi lehdessä aikaisemmin julkaistun Hollannin vasemmistopuolueen toimintaa esitelleen jutun yhteydessä esitettyä käsitystä esperantosta keinokielenä. Asko on UEA:n delegito Vaasasta.

Asko ei hyväksy käsitettä keinokieli, kun puhutaan esperantosta. Kieli on suunniteltu, sen hän myöntää, mutta kieltä on kehitetty ja muokattu kuluneen 120 vuoden aikana nykyaikaiseksi kieleksi. Sitä voi paremmin kuvata suunnitelluksi kieleksi tai yhteiskieleksi. Asko Kyttä sanoo, että Esperanto on itseilmaisun välineenä parempi kuin englanti. Näin siitä huolimatta, että hän on opiskellut jälkimmäistä kieltä selvästi enemmän.

Tamperelainen-ilmaisjakelulehdessä mainittiin 9.12.2006 Tampereen esperantoseura Antauenin järjestämä Suomen esperantoliiton 100-vuotistaivalta juhlistanut tilaisuus, jossa kerho vastaanotti vuoden tervehdyksien kokoamiseen tehdyn juhlalaatikon.

*Jukka Noponen*

# La plej grava finna esperantisto: Vilho Setälä

Dum lastaj jaroj ni havis ian modfenomenon por elekti la plejan finnan tion-kaj-tion. Post ke C.G.E. Mannerheim iĝis elektita la plej granda finno, oni havis almenaŭ voĉdonadojn pri la plej populara fikcia finno, la plej bona finna ŝlagro kaj la plej pinta pentraĵo de nia lando.

La voĉdono pri la plej grava finna esperantisto ne akiris tre grandan partoprenon, sed inter la venintaj respondoj preskaŭ unuanima rezulto estas, ke la plej grava estas Vilho Setälä. Tio ne surprizas, tiom ofte lia nomo elturniĝas en diversaj kunligoj pri la historio de Esperanto en Finnlando. Longtempa redaktoro de Esperanta Finnlando, aŭtoro de amaso da libroj, organizinto de ŝtate subvenciita Esperanto-Instituto, honora membro de UEA kaj honora prezidanto de EAF certe estas bone pravigita ulo por tiu nomumo.

Kelkaj ne volis doni voĉon kaj esprimis opinion, ke estas maljuste elekti kaj elstarigi unu homon super ĉiujn aliajn. Mi principe konsentas kun tio, sed mi memorigas, ke konkreta kaj utila rezulto de la voĉdona procedo estis havi serion da sep artikoloj pri gravaj esperantistoj. Tiuj zorge verkitaj artikoloj bone ilustras pri agadoj de personoj, el kiuj parton ekzemple mi tute ne konis antaŭe. Se ni ne havintus la celon voĉdoni pri la plej grava ulo, ni nun apenaŭ havus tiujn artikolojn.

*Mikko Mäkitalo*



***En oficejo Vilho Setälä pendas duoble, en foto kaj en pentraĵo. Krome Vilho Setälä-medalo estas vendata. Ĉio ilustras lian gravan rolon por Esperanto en Finnlando.***

## Afrodizia premio 2006

FEJO en sia jarkunveno elektis la plej afrodizian kovrilpaĝan bildon inter la pasinta jarkolekto de Esperanta Finnlando. Pro kialoj disputitaj en la kunveno, la nomumon ricevas numero 1/2006.

*La estraro de FEJO*



# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@welho.com*.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 💻 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 💻 kari.kettunen@pp1.inet.fi
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. 💻 http://esperantooulu.info/ olli.pajula@baanamail.fi
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Eero Saari) Kössinkatu 2 as 7, 24100 Salo. ☎ (02) 735 6130
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 💻 markku.saastamoinen@jippii.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. 💻 cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 📠 (09) 660 651
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2007 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnassa on perustettu uusi yhdistys, Verda Kastelo R.Y. – Esperanto-Societo en Hämeenlinna, joka ei vielä ole EAF:n jäsenjärjestö. Yhteystiedot: Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna. 💻 verdakastelo@gmail.com

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2007**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 3 | 10.5. | 15.5. | 5.6. |
| 4 | 10.7. | 15.7. | 5.8. |
| 5 | 10.9. | 15.9. | 5.10. |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

## Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 e | 1/1 sivu/paĝo 50 e |
| 1/2 sivua/paĝo 60 e | 1/2 sivua/paĝo 30 e |
| 1/4 sivua/paĝo 40 e | 1/4 sivua/paĝo 20 e |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

M posti

**Esperantolehden yhteyskortti**

Lahjatilaus: vuosikerta _ _ _ _.
Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

________________________________________
________________________________________
________________________________________

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _ / _ _.
(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _ / _ _ alkaen.
(Osoitetarra kortin alaosaan)
Uusi osoitteeni on:

________________________________________
________________________________________
________________________________________

Kestotilaus vuosikerrasta _ _ _ _ alkaen.
Tilaus: vuosikerta _ _ _ _.

Tilaajan, kestotilaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

________________________________________
________________________________________
________________________________________

**Posti-merkki**

**Suomen Esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65**
**00530 Helsinki**

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Juhlanumeron jälkeen seuraava numero ilmestyy kesäkuussa. Jutut 15.5.2007 mennessä EAF:n toimistoon. Post la jubilea numero la venonta numero aperos en junio. Artikoloj ĝis 15.5.2007 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <*eaflehti@esperanto.fi*>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2007**